

## ARKONES premiita

En la Hanoja UK oni anoncis, ke la fondaĵo Antoni Grabowski (FAG), starigita antaŭ pli ol dudek jaroj dank' al donaco de s-ro Adam Goralski por subteni la Esperantan kulturon, donis premion je la sumo de 500 usonaj dolaroj al ARKONES. La komisiono pravigis sian elekton jene:

Ĝis nun la subteno de FAG koncentriĝis al individuoj kaj institucioj. Ĉi-jare unu el la du premioj iras unuafoje al renkontiĝo, kultura aranĝo, kiu iusence jam iĝis "institucio", kreante tradicion kaj allogante lojalan, engaĝitan partoprenantaron: ARTaj KONfrontoj en ESperanto (Arkones) en Poznano, Pollando.

Ĝi estis iniciatita de artemaj kaj lingvemaj polaj (eks)studentoj en 1985, kiam ankoraŭ regis komunisma reĝimo. Tra la jaroj la aranĝo kreskis kaj internaciigis; ĝi celas publikon ne nur junularan, sed plue estas ĉefe organizata de gejunuloj. Arkones distingiĝas per tre varia programo, kovranta preskaŭ la tutan spektron de la Esperanta kulturo: estas kutime trideko da prelegoj, koncertoj, spektakloj, laborgrupoj, diskutoj kaj konkursoj. La aranĝo vivas pro la laboro de volontuloj. Kelkaj konataj nomoj aperas, sed estas ĉiam altirataj ankaŭ novaj talentuloj. En Arkones, kiun aŭspicias UEA kaj TEJO, nun kutime partoprenas pli ol 200 homoj el pli ol 20 landoj. Notindas, ke ĝi estas tempe kaj organize ligita al la studprogramo "Interlingvistikaj studoj" de Universitato Adam Mickiewicz en Poznano.

La partoprenantoj entuziasme raportas, ke Arkones donas al ili ne nur intelektan riĉigon, sed ankaŭ plezuron. Ne estas mirige, ke ĝi apartenas al la plej viglaj kaj popularaj manifestacioj de la Esperanta kulturo. Tion FAG per sia premio celas rekonii.

La eldonanto kaj la redaktoro de *La Ondo* planas veni ĉi-jare al Poznano kaj rekomendas tion al la abonantoj.



**Indonezio.** Heidi Goes por la tria fojo instruis Esperanton en Indonezio, ĉi-foje ne nur al novuloj, sed ankaŭ en kluboj kaj grupoj jam starigitaj. Danke al tio en Jogjakarto la iam starigita grupo reviviĝis kaj ricevis la nomon *La verda paco* dum la jubilea festo de Esperanto la 26an de julio. (Heidi Goes)



**Germanio.** Preskaŭ dum la tuta julio en la montrofenestro de la librovendejo Matthias en Hameln oni povis vidi librojn en/pri Esperanto kaj aliajn esperantaĵojn. Je la jubilea tago, la 26an de julio, la prezidanto de la loka Esperanto-Grupo Heinz-Wilhelm Sprick prelegis tie pri la 125-jariĝo de Esperanto. (HWS)



**Pollando.** La 125-jariĝon de Esperanto oni omaĝis per centoj da festoj kaj kunvenoj. Ili estis tre malsamaj – grandaj kaj etaj, oficialaj kaj amikaj – sed la plej dolĉa okazis en Nowy Sącz (vd. p. 10), kie oni festis la jubileon kun grandega, kelketaĝa jubilea Esperanto-torto. (Halina Komar)